

Kataluna Esperantisto



NUMERO 342 (108)
KVINA EPOKO
APRILIO - JUNIO 2007

Printempe en Vallgorguina

Agado en Valencilando

Universitataj prelegoj

Esperanto-libroj en Alibri

Seabra en la ĉinan

Arkeologio en Afganio

*Ĉina futbalo parolas
esperanton*

Piraĥoj kontraŭ Chomsky

*Notes sobre
la sociolingüística txuvaixa*

*Els maravellosos recursos
d'una llengua mutant*

Doble discurs lingüístic a Catalunya


Des de l'11 de juny Televisió de Catalunya emet dos dels seus programes més populars, *El cor de la ciutat* i *Karakia*, amb subtítols en àrab i en castellà mitjançant la televisió digital terrestre. Segons el director de TVC, Francesc Escribano, l'“objectiu és acostar els continguts als nous ciutadans del país que tenen aquestes llengües com a maternes”. La iniciativa ha sorgit de la Comissió de la Diversitat de TVC, el director de la qual, Miquel Garcia, afirma que “la cadena ha de fer un esforç per adaptar-se a la nova realitat i reflectir-la en l'emissió, contribuint a la cohesió social”. La subtitulació multilingüe també es vol ampliar al xinès i al romanès, encara que a poc a poc, “perquè l'esforç de producció és enorme”.

Estudis lingüístics han posat de relleu que el 60% dels catalans d'origen magribí tenen l'amazig com a llengua materna, en comptes de l'àrab

Segons, dades de l'Institut Estadístic de Catalunya, els ciutadans magribins i els llatinoamericans conformen les comunitats de nouvinguts més nombroses de Catalunya. El gener del 2007 hi havia empadronades prop de 200.000 persones originàries del Magrib, sobretot del Marroc, i uns 300.000 ciutadans de diferents països llatinoamericans. No obstant això, els estudis lingüístics realitzats pel Grup ▶

Segueix a la pàgina 16

Televisió de Catalunya emet dos dels seus programes més populars amb subtítols en àrab i en castellà





Zamenhof mem insistis pri sia nepoleco al la organizantoj de la Universala Kongreso en Krakovo en 1912

Esperantistoj kvazaŭ mond-policianoj

En la pasinta Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo partoprenis impona grupo de dudek kvin katalunoj. Per tio, por la dua sinsekva fojo, katalunoj fariĝis la kvara lando laŭ aliĝintoj. En si mem la afero signifas nenion: esperantistoj, malgraŭ sia laŭdira internaciismo, emas strikte klasifiki kongrespartoprenantojn laŭ landoj, sed eblus tion fari ne malpli informriĉe uzante ekzemple profesiojn. Eĉ laŭdiraj sennaciistoj montriĝas la plej insistemaj pri sia landeco. Nenio nova sub la suno. Tamen ĉi-foje, la kvanto de unuafojaj katalunaj kongresanoj estis sufiĉe granda, kaj samtempe pluraj el ili aliĝis al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj al Universala Esperanto-Asocio, i.a. por ricevi rabaton en la kotizo. Pro propraj konvinkoj, kaj eble ankaŭ pro la sento de kompreniteco, ĉar katalunoj povas aliĝi kiel aparta lando en diversaj junularaj kongresoj, pluraj plenigis la aliĝilon, skribante “Katalunion” kiel sian landon.

Post kelka tempo, rehejmeniginte, ili ricevis membrokarton de UEA. Tamen en ĝi aperis la nomo de lando, kiun ili ne skribis. Pluraj resendis la karton, klarigante, ke estas eraro en ĝi. Fakte, jam Zamenhof mem insistis pri sia nepoleco al la organizantoj de la Universala Kongreso en Krakovo en 1912. Respondon la kongresintoj kutime ne ricevis, tamen unu alvenis. Temis pri reago al letero, en kiu la plendinto deklaris, ke li

rezignas pri la membreco en UEA, se oni skribas en la membrokarto nomon de lando, kiun li ne sentas kiel la sian. En la respondo oficisto de UEA ĝentile klarigis, ke laŭ la nuna situacio, pro vetoo de Hispana Esperanto-Federacio, KEA ne povas fariĝi Landa Sekcio de UEA; sed, aliflanke, ju pli da katalunoj membras en UEA, des pli ili fortos por supervenki tiun vetoon.

La respondo estas klara sofismo. Kiun rilaton havas la membreco de KEA en UEA, por ke aperu en membrokarto landonomon ŝatatan de homo? Ĉu UEA estas komisiono de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj kaj disdonas ian rajton je sendependeco al teritorioj, kaj tial devas zorgegi pri tio, kion ĝi skribas? Ĉu entute iel gravas skribi unu landon aŭ alian, aŭ eĉ nenion, sur la membrokarto (aŭ sur kongresŝildo)? Kaj aliflanke, kiel entute premus konsiderinda nombro da individuaj membroj sen landa sekcio en UEA, se individuaj membroj povas elekti nur manplendon da komitatanoj?

Jam antaŭ sufiĉe da jaroj, KEA decidis ne plu perdi tempon, klopodante aliĝi al UEA. Mi taksas la decidon tre saĝa kaj pro la samaj kialoj mi mem ne membras en UEA de du jardekoj. Tamen, tio ne malhelpas kunlaboraĵojn fojajn: ili ja okazas kun UEA kaj HEF. Do ni plu pensu monde, sed ĉefe agu loke.

Hektor Alos i Font

En ĉi tiu numero kunlaboris: Albert Gorrell, Carles Verdugo, Darío Rodríguez, Eli Laika, Éric Collignon, Ferriol Macip, Gerard Escuer, Glòria Soler, Hariz Ferrando, Joan Català, Jordi Grau, Josep Enric Peres i Blesa, Karles Berga, Llibert Puig, Manuel de Seabra, Roger Prieto, Sjoerd Bosga, Valencia Esperanto-Junularo, Hu Xu.

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2007: individua abonanta membro, 40 eŭroj; individua subtenanta membro, 80 eŭroj; individua dumviva membro, 800 eŭroj; kolektiva membro, 80 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona agència 461 Sabadell, kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053
Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera.
Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Òscar Puig.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:
Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, kontonumero: 3025 0002 47 1433276794
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Prezidanto: Jordi Aromí; sekretario: Carles Verdugo; kasisto: Xavi Battle; informado: Guillem Sevilla kaj Pau Climent; esperantaj rilatoj: Joan Català; ne-esperantaj rilatoj: Roger Sanjaume.

Printempe en Vallgorguina

La kvara Printempa Renkontiĝo de KEJ kunigis sepdekon da homoj la 4an, 5an kaj 6an de majo en Vallgorguina, ĉe la natura parko Montnegre i Corredor. Kiel kutime en la katalunaj esperanto-aranĝoj, la partoprenantoj estis ĉiuaĝaj –la plej juna, 14-jara kaj la plej maljuna, 79–, kvankam novaĵo estis la kreiĝo de nova areto, kies anoj aĝas inter 14 kaj 16 jaroj. Ĉirkaŭ 20 homoj gustumis por la unua fojo esperanto-renkontiĝon, inter kiuj troviĝis lernantoj el la kursoj de Barcelona kaj Cardedeu kaj homoj, kies nura kontakto kun esperanto estis per la retejo lernu.net. La renkontiĝon oni propagandis ekster la esperanta medio kaj kelkaj homoj aliĝis al baza esperanto-kurso gvidita de Pedro Martín Burutxaga kaj Karles Berga. Litovino, svedo, kanariino, rusino kaj deko da gefrancianoj kontribuis al la malkrokodiligo de la indiĝenoj.

La renkontiĝoj de KEJ baziĝas sur tri samtempaj programeroj, laŭ lingvoniveloj. Ĉi-foje por komencontoj okazis tutsabata esperanto-kurso akompanita de kelkaj prelegoj pri la movado kaj la esperanta kulturo. Komencintoj havis la eblecon informiĝi pri libroj kaj revuoj por eklegi, konsultis dubosolvantojn kaj ekkonis la esperantan literaturon danke al la elstara verkisto Abel Montagut, kiu ankaŭ alportis paroligajn kartludojn. Ĉi tiuj fariĝis furoraj dum la tuta renkontiĝo, eĉ nokte en la trinkejo. Fluaj parolantoj ĝuis interesajn prelegojn, atelierojn kaj debatorndojn. En ĉi tiu okazo, aldoniĝis kunveno pri identeco de la asocio, kiu ligiĝas al longaj projektoj de KEA celantaj, unuflanke, la difinon de strategia plano kaj, aliflanke, la starigon sur firma bazo de la tuta informado de la asocio.

La enhavo de la renkontiĝo estis ankaŭ distra kaj festa: okazis ateliero pri ĵonglado, kaj du aliaj pri tutmondaj popoldancoj per la vigla akordionado de Mon Cardona. Post la vespermanĝo trinkejo kaj apuda gufujo (trankila kafejo) kunigis ĉiujn en tre festa etoso kaj multaj ĝuis ĝismatenan muzikvesperon.

En la lasta tago okazis ekskurso tra la natura parko perfekte gvidita de nia natur-spertulo Txarlie Hernández, dum kelkaj aliaj pasigis la postebrion purigante la trinkejon.



La adiaŭo estis malgaja. La etoso estis tiel amuza, amika kaj ĉarma, ke plimulto de la partoprenintoj taksis la renkontiĝon mallonga. Dum ĝi Joan Inglada prezentis, per flugfolioj, fotoj kaj video, la vilaĝon Àger, kie verŝajne KEJ venontjare organizos la 5an Printempan Renkontiĝon kune kun la 4a Ibera Renkontiĝo. Ĉi-foje oni planas organizi renkontiĝon kvar-aŭ kvin-tagan.

Post kvar spertoj, la aranĝoj sekvis propran karakteron atingitan de la KEJ-agado. Ĉi-foje la junuloj organizis ĉion preskaŭ sen helpo de la plenkreskuloj. Post la renkontiĝo

KEJ-estraro kunvenis kaj pritaksis ĝin. Ekonomie ĝi montriĝis profita, kaj el socia vidpunkto ĝi estis tre bona, ĉar la membraro kreskis kaj juniĝis. Alia granda sukceso estis la aktiva partopreno de inoj kaj ties ekanigo en KEJ: la kataluna junularo ne plu estas preskaŭ nurvira asocio. La plej juna partoprenantino ĝoje asertis, ke finfine ŝi trovis homojn kiel ŝi, kaj feliĉas kun siaj novaj geamikoj, krome ŝi akiris fluecon en esperanto. La plej maljuna miris pro la fakto, ke aro da homoj tre kleraj, valoraj, homaj kaj inteligentaj estas ankaŭ tre amuzaj.

Ferriòl Macip



Pluraj partoprenantoj en la kunveno en Ca Revolta

Festo de la diverseco en Sabadell

De antaŭ tri jaroj, Centro de Esperanto Sabadell partoprenas la Feston de la Diverseco, kies naskiĝo ŝuldiĝas al la triste famaj agresoj de naziaj grupoj en Sabadell, ĉefe kontraŭ katalunistaj aktivuloj kaj enmigrintoj.

Bilanco de tiu partopreno estu nuanca. Ni havis grandan ŝancon povi organizi semajnfinan intensivan kurson, la 13an, 14an kaj 15an de aprilo, kadre de la festo, sed tro marga ĉeestantaro (3 personoj) ne povas kontentigi nin, ĉefe se oni konsideras, ke la kurso ĝuis grandegan propagandon per pli ol 120 asocioj partoprenintaj la Feston. Aliflanke, ĝenerala impresio estas, ke homoj tre favoris esperanton okaze de la festo kaj la kurso (multaj personoj informiĝis kaj bedaŭris sian neeblo partopreni). Ankaŭ budo dum asoci-foiro, kadre de la Festo, en la sekva semajnfino, sabaton la 21an, permesis tre interesajn kontaktojn. Krome manifesto estis tradukita kaj afiŝita en esperanton kaj ni partoprenis debaton pri identeco de la gefiloj de afrikaj enmigrantoj post spektado de filmo *Nigra Katalunio* de Gilbert-Ndungu Nsangata, kinreĝisoro el Kongo rifuĝinta en nia urbo.

ec / lp / red

7a Ekspozicio de la anarkiisma libro

De la 18a ĝis la 22 de aprilo, Valencio Esperanto-Junularo partoprenis en la 7a Ekspozicio de la Anarkiisma Libro, ĉiujare organizita en Valencio de la kultura grupo "Al Margen". Temas pri libro-foiro, kie partoprenas multaj lokaj kulturaj asocioj, alternativaj muzik-distribuejoj kaj diversaj regionaj grupoj de la liberecana sindikato CNT.

La budon prizorgis dum tiuj kvin tagoj Raúl Salinas, Joan Català kaj Josep Enric Peres i Blesa. VEJ spertis bonegajn momentojn, en kiuj oni konis novajn interesitojn, kiuj proponis prelegojn kaj kursojn por siaj kulturaj grupoj. En la budo troviĝis esperantaj verkoj, flugfolioj, vortaroj kaj pluraj muzikaj KDoj, kiuj vekis la atenton de la publiko. Sendube estis pozitiva montrado de la esperanta movado kaj ni jam vidas, ke ĝi estis frukto-dona, ĉar du semajnojn poste oni organizis rondan tablon en la kulturdomo Ca Revolta kaj prelegon en mezlernejo en Castelló de la Ribera; julie okazos ateliero de esperanto en Benicàssim kaj ankaŭ multaj homoj partoprenos en la SPR en Marina Baixa.

vej

Prelegoj en Valencilando

La 9an de majo, Joan Català, Josep Maria Milla kaj Ferriol Macip prezentis du sinsekvajn atelierojn pri esperanto en la mezlernejo Vicente Gandia de Castelló de la Ribera (Ribera Alta). La atelierojn oni faris en la prelegsalono de la mezlernejo, kiu estis plenplena de homoj. Post la ateliero la instruistoj el la mezlernejo invitis nin tagmanĝi en apuda restoracio kaj ĉiuj montris al ni sian emocion kaj ĝojon. Anekdote menciindas, ke patro de unu el la partoprenintaj knaboj tuj venis koni nin en la restoracion, ĉar lia filo entuziasme rakontis hejme pri la esperanto-ateliero. Kelkajn tagojn poste ni ricevis dankmesaĝon de la instruistoj. Ili klarigas, ke la mezlernejoj kaj kelkaj instruistoj deziras multe pli profunde koni esperanton, petis pliajn informojn kaj invitas nin denove ripeti la prelegon venontjare.

La 11an de majo estis antaŭplanita prelego pri esperanto kaj lingva demokratio en la kulturcentro Ca Revolta de Valencio. Nur

unu neesperantisto interesiĝis pri la prelego, malbone reklamita de la organizintoj. Tamen, kunvenis sufiĉe nombra grupo da valenciaj esperantistoj kaj tiel oni profitis la okazon por aranĝi strategian kunvenon.

fm

Esperanto en mezlernejoj

Ferriol Macip kaj Llibert Puig prezentis esperanton en la mezlernejo de Sant Quirze del Vallès, la 20an de aprilo. La prezento konsistis en du atelieroj por du grupoj de po 25 infanoj 14- kaj 16-jaraj, kun materialoj pretigitaj en la antaŭa jaro de Ferriol Macip kaj Jomo Milla.

Malkiel en la pasinta jaro, kie okazis kvin prezentoj en la lernejoj ĉirkaŭ la Librotago, la 23an de aprilo, ĉi-foje nur unu mezlernejo invitis nian Asocion prelegi. Pasint-jare estis dissenditaj 620 leteroj en novembro kaj decembro al sama nombro da mezlernejoj ĉirkaŭ Barcelono, dum ĉi-foje oni sendis retmesaĝon proponantan prelegon pri lingva diverseco kaj esperanto al ĉiuj mezlernejoj de Katalunio en la monato februaro. Ni analizas la kialojn de la relativa malsukceso por la venonta jaro.

Universitataj prelegoj

Carles Verdugo kaj Jordi Aromí, prezentis esperanton al ok studentoj la 17an de aprilo en la fakultato pri pedagogio de la Barcelona Universitato. La aranĝo daŭris du horojn kaj enhavis ankaŭ praktikan parton, surbaze de la materialo pretigita la pasintan jaron de Ferriol Macip kaj Josep Maria Milla.

Siavice Hèctor Alòs, prelegis al ses studentoj la 24an de aprilo en la filologia fakultato de la Barcelona Universitato en aranĝo organizita de la Sindikato de Studentoj de la Kataluna Landaro (SEPC). Li prezentis unuflanke skizon de la ĉefaj ideologioj en la esperanto-movado kaj aliflanke lingvistikan prezenton de la lingvo. Fine, li distribuis skizon de esenca lingvistika bibliografio pri esperanto en naciaj lingvoj kaj la kvizoforman materialon pretigitan de Ferriol Macip kaj Josep Maria Milla.

La kunlaboro kun SEPC daŭras kaj ĝi verŝajne permesos la instruadon de esperan-

to kiel elektebla fako en la sama universitato dum la venonta kurso.

KEJ en Granollers

La pasintan 10an de februaro KEJ vizitis la urbon Granollers por partopreni en du sinsekvaj inform-agadoj. La unua temis pri intervjuo kun Jordi Aromí, prezidanto de KEJ, en loka televidstacio. La intervjuo konsistigis 25-minutan programeron kun la nomo "mil vizaĝoj", dum kiu la prezentisto kaj la prezidanto de KEJ malstreĉe babilis pri esperanto. Post tio, Jordi Aromí kaj Carles Verdugo, KEJ-Sekretario, prelegis en la kulturcentro-restoracio *Anònims*. Kvankam la partopreno ne estis amasa, renkontiĝis kelkaj interesitoj, kiuj starigis sufiĉe interesan debaton pri la neceso de internacia lingvo, kaj la taŭgeco de esperanto rilate tiun bezonon. El tiu agado kaj postaj kontaktoj sekvas, ke oni antaŭvidas okazigi kurson en la sama loko en aŭtuno.

cv

Amaskomunikiloj

Radio Sabadell intervjuis Llibert Puig, mardon la 17an de aprilo, pri la rapida kurso de esperanto okazinta en la sidejo de CES dum



La Centra Biblioteko de Terrasa organizis ekspozicion de esperanto-libroj el sia arkivo okaze de la Modernisma Foiro de Terrasa, la 5an kaj 6an de majo.

la semajfino de la 13a kaj 15a de aprilo, gvide de Éric Collignon, enkadre de la “Festo de la Diverseco”. Siavice, Manel Vinyals estis intervjuita, la 28an de aprilo en la programo “Denominació d’origen” de Barcelona TV.

KEJ leĝigita

La nova estraro de KEJ, elektita en februaro, ĝisdatigis sian administran statuson kaj oficialigis la novan statuton kaj gvidantaron ĉe la kataluna registraro. Ĝi ankaŭ registriĝis ĉe fisko kaj malfermis bankkonton ĉe Caixa d’Enginyers. En tiu periodo la estraro kunvenis du fojojn kaj ankaŭ kun Llibert Puig, prezidanto de Centro de Esperanto Sabadell. Tiu ĉi societo, la plej grava loka esperanto-asocio en Katalunio, proponis ŝrankon kaj lokon senpage al KEJ, por ke ĝi havu sidejon.

Konversaciaj rondoj de KEJ

La KEJ-estraro konsideris dezirinda la altigon de la lingva nivelo de la membraro. Tial oni decidis starigi sabatajn konversaciajn rondojn en diversaj urboj, kie loĝas membroj de la junulara asocio. En junio okazis la du unuaj tiaj babilaj renkontiĝoj en malstreĉa etoso: la unuan semajnon en Cardedeu kaj la duan semajnon en Mataró, ĉe la plaĝo. Renkontiĝis deko da homoj. Malgraŭ

la mallonga sperto, la sukceso de la konversaciaj rondoj por la plibonigo de la lingva nivelo kaj por akirigi fluecon al komencantoj jam fariĝis evidenta.

fm / red

Gramatika sesio en CES

Dimanĉon la 22an de aprilo 12 homoj partoprenis “gramatikan sesion” en Centro de Esperanto-Sabadell. Hèctor Alòs gvidis kvar-horan promenadon tra diversaj malfacilaj kaj malofte rimarkitaj aspektoj de la esperanto-gramatiko. Pro la montrita intereso, oni klopodos ripeti la sperton, eble ne nur pri lingvaj aspektoj de esperanto, sed ankaŭ pri historiaj, sociaj aŭ ideologiaj.

Xavi Batlle enposteniĝis

Xavi Batlle eklaboris en la projekto de aŭtomata tradukilo al esperanto, elvolvata de la universitato Pompeu Fabra. La projekto bezonis fakulon pri esperanto kaj elektis lin el inter tri kandidatoj. Xavi Batlle, kemiisto loĝanta en Sabadell, lernis esperanton en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, kie li studis, kaj nuntempe estas la kasisto de KEJ.

Kunlaboro kun Can Masdeu

Esperantistoj el la socia okupita centro Can Masdeu –unu el la plej malnovaj kaj famaj en Katalunio– okupiĝos pri la manĝoj kaj gvidos la ĉiutagan laborskipojn dum la julia Senprograma Renkontiĝo en Callosa d’en Sarrià. Can Masdeu disponigas al KEJ ties ilojn, potojn, sperton kaj spertulojn por kuiru mamultekostan sed bonan manĝon.

Rezultoj de enketo

En rilato al sia projekto por disvolvo de la asocia identeco de KEA –prezentita en la pasinta numero de nia revuo– Guillem Sevilla kaj Rut Rovira lanĉis enketon inter la aliĝintoj al la ret-listo de KEA “Nia Listo”. La enketo celis kompreni, kiel konceptas la asocion la membroj kaj simpatiantoj. La enketo konsistis en 16 demandoj –5 pri la enketito kaj 11 pri la asocio– kaj ĝin respondis 14 homoj.

La konversaciaj rondoj de KEJ disvolviĝas plej malstreĉe



EU LANKA

El la respondoj, rimarkindas, ke el la priskriboj de KEA plej oftis tri adjektivoj: “malgranda”, “aktiva” kaj “mens-malferma”. Aliaj tri esprimoj estis plej popularaj por priskribi, kian KEA oni volas: “granda”, “tia kia ĝi estas” kaj “unuigita kun la socio”. Pri la ideoj, kiujn KEA devas defendi, la plej ripetitaj estis “paco”, “lingva egaleco” kaj “digno de ĉiuj popoloj kaj kulturoj”.

La enketitoj esprimis fortajn kritikajn sintenojn. Ekzemple, al la ideo, ĉu esperantistoj ofte montras sin sektecaj, larĝa plimulto voĉdonis jese; kaj samklara evidentiĝis la konsidero de la TTT-ejo de la asocio: ĝi estas kaosa.

La nuna paŝo de la projekto celas kompreni la sintenon de la membroj: nur en sekva ŝtupo oni esploras la bildon, kiun havas eksteruloj. Ambaŭ vidpunktoj, kontrastitaj kun analizo pri la agado kaj celoj de la asocio permesos krei fundamenton por starigi solidan komunikad-politikon de KEA.

Esperanto-fako en la librejo Alibri

Komence de la jaro la barcelona librovendejo Alibri faris signifan mendon de libroj pri esperanto. Temas la plej granda en Barcelono pri lingvoj kaj ĝia situo ĉe la sidejo de la Universitato de Barcelono igas ĝin tre populara inter la tieaj studentoj pri filologio. Antaŭe Alibri proponis ĉefe lernolibrojn de esperanto ofte en la angla aŭ franca, eldonitaj de grandaj kolektoj, kiel Teach Yourself kaj Assimil. Nun la elekto estas pli varia kaj ĝi enhavas ne nur lernolibrojn kaj vortarojn, sed ankaŭ katalunlingvajn verkojn pri esperanto. La rezulto de la veto de Alibri ŝajnas trafa, ĉar nia libroservo ricevis novan mendon de ĝi en junio pro elĉerpiĝo de parto de la stoko.

Reta vendejo en Brazilo

La Brazilia Sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ekfunkciigis retvendejon per la programaro verkita de Joan Català, anoncita en nia pasinta numero. Temas pri la unua esperanto-asocio ekuzinta tiun liberan programon, senpage uzeblan de ĉiu ajn. Nia asocio antaŭvidas enretigi per ĝi sian libroservon en la tuj venontaj monatoj.

“La armeoj de Paluzie” ĉinen

Aperis la tria eldono de la ĉina traduko de la romano *La armeoj de Paluzie* de Manuel de Seabra. Ĉi tiu verko gajnis en 1982 la plej gravan literaturan premion (Premion Círculo de Leitores) en Portugalio, kvankam oni ĝin maldonis, pro tio ke la libro jam estis aperinta en la kataluna en la sama jaro. Tuj poste ĝi estis eldonita en la portugala (1982) kaj en la rusa (1985). Nur en 1996 publikiĝis la esperanta originalo. En la jaro 2003 aperis ĉina traduko, el esperanto, ĉe la eldonejo Tuanjie en la urbo Ŝaŝi (provinco Hubejo). Temas pri belega libro, en luksa papero, kun 48 tutpaĝaj ilustraĵoj de kino kaj pentrarto celantaj rekrei por la ĉina leganto la specialan etoson de Eŭropo kaj aparte de Katalunio en la komenco de la 20a jarcento, en kiu disvolviĝas la romanaj okazaĵoj. La libro havas ankaŭ multnombrajn notojn pri ĉiuj strangaĵoj (por ĉino), pri kiuj oni parolas en ĝi, kaj la tria eldono reproduktas la kovertojn de la diverslingvaj eldonoj kaj portas portreton de la tradukistino, Lu Deng.



Katalunoj en La Kancerkliniko

La aprila-maja-junia numero de la gazeto *La Kancerkliniko* havis kunlaboraĵojn de eĉ kvar KEA-anoj. Karles Berga publikigis du spicajn rakontetojn titolitajn *La kunveno* kaj *Pasporta Servo*, Manuel de Seabra aŭtoris la satiran poemon *Balado de la konsumsocio*, Guillem Portell elkatalunigis *Broso* –novelon de Pere Calders– kaj Arnau kontribuis per tri desegnoj.

kb

Dokumentoj enarkivigitaj

Jordi Grau i Gatell transdonis ĉi-paske la arkivon de sia avo Jaume Grau Casas al la Arkivo de la Frankisma Subpremado de Elx. Jaume Grau Casas estis elstarega esperantisto antaŭ la interna hispana milito kaj la ĉefa tradukinto de la *Kataluna Antologio*, eldonita en 1925 kaj represita en 1931. Li estis ankaŭ redaktoro de *Kataluna Esperantisto* inter 1920 kaj 1924. Li membris en la Lingva Komitato kaj fariĝis vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Post la milito, li ekziliĝis kaj gvidis esperanto-kurson en koncentrejo en Nord-Katalunio. Li mortis en Valencio en 1950. Inter la dokumentoj



nun kuŝantaj en la arkivo de Elx estas leteroj, memoraĵoj el la malliberejo kaj koncentrejoj, sed ankaŭ teatraĵoj, poemoj, divertimentoj kaj eseoj.

Nova revuo en la aragona

Nia samasocio Ferran Marín lanĉis *Ambista*, imponan ret-revuon ĉefe en la aragona lingvo (www.ambista.com). La revuo okupiĝas pri arkitekturo, tradicioj, literaturo, kulturaj heredaĵoj kaj ankaŭ pri la aragona lingvo. Kvankam la revuo estas ĉefe en ĉi tiu lingvo, ĝi havas ankaŭ artikolojn en aliaj latinidaj lingvoj de Iberio. Entute *Ambista* aparte elstaras pro la kvalito kaj la temaro: ĝi celas esti tute normala revuo, laŭ la kvalito de la enhavo kaj la dizajno, kvankam tiaj eldonaĵoj malofte

ekzistas en malfortaj lingvoj. La impona unua numero survojas al tiu celo per elstara artikolo multfota pri la lombarda romaniko en Alta Aragono. Jen plia ŝtupo cele al la renormaligo de la aragona lingvo.

Doktoriĝo

La 18an de aprilo nia samasocio Haritz Eder Ferrando prezentis antaŭ tribunalo sian doktoran disertacion ĉe la Politeknika Universitat de Katalunio. La esploro analizas la uzeblon de reciklitaj termoplastaj materialoj por aplikoj en la konsum-elektronika fako". Verkita en la kataluna, ĝi havis mallongajn resumojn katalune, hispane, esperanto kaj angle kaj ricevis la plej altan noton: "bonega kun laŭdo"

Kun granda bedaŭro ni devas informi pri la forpaso de s-ino Maria Eugenia Dalmau, 78-jara la 17an de aprilo. Ŝi, kun ŝia frato Delfi, monprovizis la premion "Delfi Dalmau" organizita de KEA memore al ilia patro, eminenta kataluna esperantisto. Ni tre sincere kondolencas la familianojn.

Nia delonga samasocio Jaume Inglada i Roig forpasis, 60-jara, la 10an de aprilo. Ni korprenite kondolencas lian familion.

Taller d'esperanto: *Introducció a la llengua internacional en 4 hores!*

Quan? 6 i 7 de juliol, de 19h a 21h.
(dues hores el divendres, i dues hores el dissabte)

On? Casal Jove de Benicàssim
d'Bayet, 68 Benicàssim

Organitza:



Juventut Valenciana d'Esperanto
Valenci Esperanto-Junularo
www.esperanto.cat/vj

Amb la col·laboració de:



Arkeologiado en Afganio

Du membroj de KEA, Roger Prieto kaj Felip Artero, pasigis kvar monatojn en Afganio, ĉi-vintre kaj printempe. Ilia ĉefa celo estis la komenco de arkeologia prifosado en la regiono de Ĵalalabado, kiun ili rekonis en antaŭa vojaĝo.

“Kelkaj burokrataj problemoj ne permesis fini la propradiran prifosadon”, klarigas Roger Prieto, ĝian gvidanton. “Ni plenumis limsignan fazon, kiu malkovrigis la plimulton de la strukturoj de budhisma monaĥejo de la periodo de Gandharo, kun kronologio de la 2a-3a jc. a.K. Tio estas, same la parto dediĉita al la kultado, kiel tiu dediĉita al la ĉiutaga vivo”.

Gandhara estas la nomo de malnova reĝlando, situanta en la nord-okcidento de la nuna Pakistano kaj oriento de nuna Afganio. Ĝiaj ĉefaj urboj estis Purushapura (hodiaŭa Peŝavaro) kaj Takshashila (hodiaŭa Taksilo). Ĉi tiu reĝlando daŭris inter la 6a jc. a.K. ĝis la 11a jc. p.K. kaj travivis diversajn avatarojn, kiel sian sinsekvan konkeron fare de persoj, grekoj, hindoj, nordaj nomadoj kaj islamanoj. La regiono ricevis la profundan stampon same de oriento kiel de okcidento: unuflanke de helenismo pro la Aleksandra konkero kaj ĝia posta ligiteco al la Baktriaj helenismaj ŝtatoj, kaj aliflanke de budhismo el Hindio dum la 1a jc. a.K. El la fandiĝo de tiuj du potencaj influoj disfloris impona t.n. grek-budhisma arto – ankaŭ nomata gandhara arto –, ĉefe dum la apogeo de la lando, inter la 1a jc. a.K. kaj la 5a jc. p.K.

La nuna stato de la prifosado, krom la strukturon de la monaĥejo, ankaŭ malkovrigis grandan kvanton da ceramikaĵoj, teksiletoj kaj ŝlosiloj. La prifoson laboron plenumis ĉ. 18 homoj dum kvin semajnoj. Laŭ Roger Prieto, “la tuta valo de Ĵalalabado plenas de malgrandaj arkeologiaj zonoj situantaj sur la montetoj – la plimulto el ili, disrabitaj. La loko, kie ni laboris, elstaras pro ĝia situo en la valo kaj, malgraŭ la disrabo, ĝi konservas bonan potencon de strukturoj. La ŝtelistoj okupiĝis ĉefe pri la religia parto, kiu montras multnombrajn truojn difektintajn kelkajn stupaojn.”

Mankas ankoraŭ ĉ. du-monata laboro por fini la projekton, sed haltigis ĝin burokrataj



ROGER PRIETO

La prifosadoj aperigis grek-budhisman monaĥejon de la 2a-3a jc. a.K.

problemoj – unu el la ĉefaj malhelpoj por la tuta agado. La respondeculoj plu laboras por solvi ilin, sed samtempe planas elturniĝon, se la klopodoj montriĝas malsukcesaj. En tiu lasta okazo, la surlokaj laboristoj plifirmigos kaj protektos la ĝis nun aperintajn restaĵojn kaj oni starigos protektan ĉirkaŭmuron, atende de pli favoraj tempoj.

Aliflanke, la projekto pozitive influis la lokan komunumon. Unu el ĝiaj rezultoj estis la kreado de laborpostenoj en deprimita regiono, kie oni praktikas vivtenan ekonomion kaj kie multaj loĝantoj ne povas labori kiel masonistoj en Kabulo dum vintro, ĉar la malvarmo interrompas la konstrulaborojn. Oni aparte zorgis pri la enskipigo ankaŭ de inoj, kiuj okupiĝis ĉefe pri la purigo kaj registigo de la eltrovaĵoj kaj foje rekonstruis kelkajn elementojn. La kriterioj de elektado de la laboristoj baziĝis sur la bezono de familioj pri mono, en kio la tre

aktiva Revolucia Organizo de Afganaj Inoj kunlaboris.

La projekto celis ankaŭ la plitaksadon de la historia-arkeologia heredaĵo de la lando, tre difektita dum la lastaj jaroj kaj tre prirabita, ĉefe dum la talibana regado. “Vere nun la homoj rigardas la aferojn per aliaj okuloj kaj alte taksas ilin”, klarigas Roger Prieto. Kaj li aldonas: “Jen ekzemplo: en feritago unu el la laboristoj trovis ceramikaĵojn, fosante tombon en la vilaĝa tombejo, kaj ĝin portis la sekvan tagon en la prifosejon, donace por la estonta muzeo de Olas Darah. Li diris, ke estas pli bone, ke la tuta komunumo profitu el ĝi, ol ke iu provu ĝin vendi. Oni ankaŭ avertis nin, kiam ni estis finintaj la limsignajn laborojn, ke ŝtelfosanto agis apud la arkeologia zono.”

Laste, sed ne balaste, la projekto celis evidenti aliajn religiajn realaĵojn en Afganio kaj pruvi, ke ne ĉiam regis en ĝi totalisman islamismon. □

Per esperanto la ĉina futbalo iras al la mondo



NR PH

Manel Vinyals dum trejnado kun ĉinaj futbalistoj

La 12an de junio, en la ĉina urbo Fuĝoŭo, ĉefurbo de la provinco Fuĝjano, okazis la oficiala inaŭguro de nova futbal-klubo, C.D. Tortosa, omaĝe al la kataluna teamo Club Sportiu Tortosa. Temas pri la dua ĉina teamo kun la nomo “C.D. Tortosa”, ĉar jam en Kantono fondiĝis, la pasintan 20an de oktobro, samnoma sport-klubo, kiel rezulto de la interrilatoj inter la kataluna teamo kun Ĉinio

– interrilatoj, en kiuj esperanto grave rolas.

La jaron 2005, tri knaboj de la sportlernejo de Hubejo –Hu Nan, Cai Wei kaj Huang He– fariĝis futbalistoj en C.D. Tortosa. Temis pri tri 15-jaraj promesplenaj ludantoj, kiuj daŭrigis sian lernadon en Katalunio kaj ĉiuespere trejnis futbalon. La revo de tiuj junuloj plenumiĝis danke al la agado de du

esperanto-aktivuloj en ambaŭ landoj –Manel Vinyals kaj Hu Xu–, kiuj interkonatiĝis dum la ĉirkaŭmonda vojaĝo de la unua en 2004, kaj estis parto de aliaj komunaj peresperantaj agadoj: Manel Vinyals estas entreprenisto kaj Hu Xu membras en la Fuĝjana Esperanta Komerca Ligo. La okazo estis jam plurfoje sukcese ekspluatita de la kataluna kaj ĉina esperanto-movadoj en sia informado al la gazetaro.

La futbal-rilatoj de C.D. Tortosa kun Ĉinio profundiĝis ekde 2005 kaj ampleksiĝis al aliaj ĉinaj urboj. La gvidantoj de la Futbal-Asocio de Fuĝoŭo opinias, ke C.D. Tortosa kunportos pli modernan futbalon kaj helpos la futbalon en la regiono, dum la kataluna teamo plinombrigas sian lernejon de lernantoj: en Fuĝoŭo 800 lernantoj trejniĝas en la nova filio de C.D. Tortosa. Samtempe la utileco de esperanto estas ankaŭ publike agnoskata. En la solena oficiala inaŭguro de la tria C.D. Tortosa, en la urbo Fuĝoŭo, partoprenis elstaraj aŭtoritatoj politikaj kaj sportaj. La provincaj amaskomunikiloj pritraktis la eventon kiel gravan novaĵon, kelkaj futbalistoj estis intervjuitaj de la televida programo de la televido de Fuĝoŭo, kiu elsendis specialan programon trifoje tage dum kvin tagoj. En la inaŭguro, esperanto aperis apud la ĉina en pluraj afiŝoj, kaj estis uzita dum la solenaĵo, tial amaskomunikilo informis, ke “per esperanto la futbalo de Fuĝjano iras al la mondo”. □

La televido de Fuĝoŭo elsendis specialan programon pri la inaŭguro de la nova C.D. Tortosa



HU XU

Notes sobre la sociolingüística txuvaixa

Eduard Fromin

Traducció: Elena Mèlnikova i Karles Berga

Aquestes notes responen al pensament de l'autor sobre algunes qüestions que fan referència al destí del poble txuvaix. L'article inclou també fragments d'observació de la vida diària. La major part dels episodis estan predefinites per a l'ús com a material il·lustratiu en investigacions teòriques. Per raons ètiques no esmentem informacions confidencials, com ara els noms o adreces dels nostres informadors.

A manera d'epígraf

En un futur proper tota la humanitat parlaria txuvaix. Però això serà realitat tan sols si, per casualitat, es descobreix que la llengua guareix la sida.

ARússia se sap molt més sobre els poc nombrosos pobles del nord que sobre els txuvaixos, que són 1,5 milions ⁽¹⁾.

Els mateixos mantenidors de la cultura txuvaixa consideren el txuvaix com un poble poc nombrós ⁽²⁾.

Oficialment s'anomena poble nombrós aquell que té més d'un milió de persones. Els txuvaixos ja van superar aquest límit a començaments del segle xx. No obstant això, persisteix encara un sentiment de poble poc nombrós a causa de la política nacional que hi ha hagut durant l'imperi rus, i encara després amb la URSS, fins avui dia.

La identificació nacional de cada dia dels txuvaixos ve sempre acompanyada d'una menció a russos i tàtars. Alhora, la consciència ètnica dels txuvaixos rep el suport de l'oposició: txuvaixos-tàtars (en major grau) i txuvaixos-russos (en menor grau). Compareu: *Татар сакки çине саваламасър ан лар* (traducció: “no seguis sobre el banc d'un tàtar abans que l'hagis treballat amb el



Pescadors sobre el Volga a Xupaixkar

ribot”); *mymap nek* (“com un tàtar”) – per a subratllar un fet o una conducta impròpies. No hi ha proverbis sobre russos que siguin anàlegs a aquest. Aquest fenomen es produeix, molt probablement, per la diferent adscripció religiosa dels russos, els txuvaixos i els tàtars. El cristianisme dels dos primers es contraposa a l'islamisme dels últims. A més d'això, els russos són un poble configurat com a estat, la cultura del qual els txuvaixos coneixen més bé que no pas la dels tàtars ⁽³⁾.

En determinades situacions els txuvaixos es poden considerar a si mateixos russos o bé com a pertanyents als dos grups nacionals. Així succeeix, per exemple, quan viatgen a l'estranger o més enllà de les fronteres de la seva república, o fins i tot en el mateix medi txuvaix quan es tracta de mostrar els grans èxits del país, com una victòria en els

Entre els txuvaixos persisteix encara un sentiment de poble poc nombrós degut a la política nacional existent durant l'Imperi Rus i encara després amb la URSS



rístics d'aquella època eren: “No parlis txuvaix: no ets a casa!”; en una botiga i com a resposta a qui es dirigia al caixer en txuvaix: “Parla en una llengua humana!”; el director d’una escola l’últim dia abans de les vacances: “Nens, en cap cas viatgeu al poble: allà us infectareu amb el txuvaix!”. I precisament en aquestes condicions es produeix una forta urbanització dels habitants de la República de Txuvàixia. Només cal dir que, en aquell temps, la població de la capital, Xupaixar (Txeboksari, en rus), es va doblar i, des del punt de vista ètnic, els txuvaixos van esdevenir majoria. Però a causa de les circumstàncies van haver d’amagar la seva pertinença ètnica i, fins i tot, rebutjar la pròpia cultura. Avui dia la tendència cap a la urbanització encara es manté forta.

El “transvasament nacional” és un fenomen característic per als txuvaixos. En essència, es tracta del següent: molts portadors de la cultura txuvaixa se senten incòmodes considerant-se a si mateixos txuvaixos. Una forma d’afalac molt apreciada per una dona txuvaixa és: “no sembla gens que siguis txuvaixa”. Alhora el txuvaixos són etnocèntrics, no sols amb relació a la gent d’altres països, sinó també amb gent d’altres grups ètnics amb qui estan emparentats.

Episodi dos

Un mestre als seus estudiants:

– Si de sobte us adonéssiu que per les vostres venes corre sang d’una altra nació, què faríeu?

Una estudiant:

– Si em trobessin sang txuvaixa, seria la primera a penjar-me!

Ensenyar a les noves generacions només el rus va esdevenir tan habitual en la societat txuvaixa que un nen de ciutat parlant als seus pares en txuvaix despertava sentiments de compassió. Txuvaixos de llengua materna txuvaix usen el rus per a parlar amb un infant, encara que aquest també parli txuvaix. Això es considera natural.

jocs olímpics, les grans obres d’artistes famosos, etc. Una expressió molt típica és *Этир, вырăссем, вăйлă (ăслă) çав!* (“nosaltres, els russos, som molt potents [savis]!”)

Té una base religiosa l’actual tradició de posar noms russos, que inclou també organitzacions i institucions, encara que estiguin compostes per membres exclusivament txuvaixos.

Episodi u

Una botiga estranya, anomenada en rus ‘Món infantil’, en una ciutat txuvaixa. A l’aparador penja una felicitació pel cap d’any en rus i en anglès, però no en cap cas en txuvaix.

